

## Kontinentaj Kongresoj - Azio

La nomo estas 'Azia Esperanto-Kongreso (AEK)' kaj ekde 2016 'Azia Esperanto-Kongreso (UEA)'. Principe, la kongresoj okazas ĉiun trian jaron.

### 1-a Kongreso, Ŝanhajo, Ĉinio, 21-a ĝis 25-a de aŭgusto 1996

486 aliĝintoj el 16 landoj; kun la temo 'Azio kaj la 21-a jarcento'

### 2-a Kongreso, Hanojo, Vjetnamio; 22a ĝis 25a de aŭgusto 1999

420 aliĝintoj el 16 landoj; kun la temo 'Kunlaboro por Paco, Stabileco, kaj Disvolvigo'

### 3-a Kongreso, Seulo, Koreio, 23-a ĝis 26-a de aŭgusto 2002

552 aliĝintoj el 16 landoj; kun la temo 'Interkompreniĝado inter kulturoj'

### 4-a Kongreso, Katmanduo, Nepalo, 25-a ĝis 29-a de aŭgusto 2005

173 aliĝintoj el 7 landoj (el ili pli ol 100 el Nepalo). Prokrastita de marto 2005.

### 5-a Kongreso, Bengaluro, Barato, 11-a ĝis 15-a de februaro 2008

254 aliĝintoj el 25 landoj; kun la temo 'Esperanto en multlingva Azio'. Ampleksaj informoj haveblas en du PDF-dokumentoj en la [arkivigita eksa kongresa retejo](#).

### 6-a Kongreso, Ulanbatoro, Mongolio, 19-a ĝis 23-a de junio 2010.

254 aliĝintoj el 33 landoj; kun la temo 'Azia Harmoniiĝo per Esperanto'.

### 7-a, Kongreso; Jerusalemo, Israelo, 18-a ĝis 22-a de aprilo 2013.

Kongresa temo: 'Ekologio de paco - paca kunvivado de homo, medio kaj naturo'

### 8-a Kongreso, Ĉjuanĝoŭ, Ĉinio, 3-a ĝis 6-a de novembro 2016

278 aliĝintoj el 20 landoj. Kongresa temo : 'Esperanto por Azia kunlaboro en reta epoko'

### 9-a Kongreso, Danang, Vjetnamio, la 25an-28an de aprilo 2019, 281 partoprenintoj (vidu la foton).

Sume 9 kongresoj en 9 malsamaj urboj kaj 7 malsamaj landoj kun ĉ. 2700 aliĝintoj

Krome okazas sudaziaj kongresoj kaj trilandaj kongresoj inter Indonezio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

